



1(137)
2013

Apudvistula Bulteno

de Krakova Societo ESPERANTO

Bultenon redaktas: ĉiuj anoj de Krakova Societo ESPERANTO,
Adreso por korespondi: str. Sokolska 13, 31-515 KRAKÓW

Maria Konopnicka

Ślizgawka

Równno, równno, jak po stole,
Na łyżewkach w dal ...
Choć wyskoczy guz na czole,
Nie będzie mi żal!

Guza nabić – strach nieduży,
Nie stanie się nic;
A gdy chłopiec zawsze tchórzy,
Powiedzą, że fryc!

Jak powiedzą, tak powiedzą,
Pójdzie nazwa w świat;
Niech za piecem tchórze siedzą,
A ja jestem chwat!

Zła zima

Hu! Hu! Ha! Nasza zima zła!
Szczypie w nosy, szczypie w uszy
Mroźnym śniegiem w oczy prószy,
Wichrem w polu gna!
Nasza zima zła!

Hu! Hu! Ha! Nasza zima zła!
Płachta na niej długa, biała,
W rękę gałąź oszroniała,
A na plecach drwa ...
Nasza zima zła!

Hu! Hu! Ha! Nasza zima zła!
A my jej się nie boimy,
Dalej śnieżkiem w plecy zimy,
Niech pamiętkę ma!
Nasza zima zła!

Glitumejo

Glate, rekte, sen danĝero,
Sur glitiloj for ...
Eĉ la frunto kun tubero,
Por mi – la honor'!

Bati al si la tuberoz,
Por la knab' fason'!
Ja timulo sen mizero,
Nomiĝas poltron'!

Ĉu rid-nomo aŭ mok-nomo
Disvatiĝos ĝi;
Poltron' ĉe la forno restu!
Bravul' estas mi!

trad. *Andrzej Janusz Kraszewski*

Mava vintro

Hu! Hu! He! Vintro mava tre!
Pinĉas nazojn, blovimpetas,
Frostan neĝon en nin ĵetas
Ha, ebla pere'!
Vintro mava tre!

Hu! Hu! He! Vintro mava tre!
Sur ĝi blanka tuk' krud-forma,
En la mano branĉ' enorma,
Dorse ŝtipoj, he! ...
Vintro mava tre!

Hu! Hu! He! Vintro mava tre!
Ni ne timu, ne kompatu,
Vintron per neĝbuloj batu,
Por memoro, ve!
Vintro mava tre!

trad. *Lidia Ligeza*

Rimarko de redakcio: Tre rare ni uzas interjekciojn. Vere konata estas nur la majstra „Ho, mia kor!“ Ĉe la versaĵeto de M. Konopnicka estas okazo por rememorigi uzadon de certaj interjekciojn:

- hu! – interjekcio uzata por esprimi ektimon, ekz. Hu! – li ekkriis kaj forsaltis ...
- he! – interjekcio uzata 1. por altiri ies atenton: He, kion vi portas en la sako? 2. por esprimi ironian kontraŭdiron: He, kian sencon havus la skribado?
- ha! – interjekcio esprimanta ekmiron, surprizon antaŭ bona aŭ malbona: Ha! tio estas terura!
- ve! – interjekcio esprimanta 1. ĝeman plendon pro kor-doloro: Ve al ni, ni estas ruinigitaj!
2. minacon pri malfeliĉo aŭ malbeno por iu alia: Ve estas al la viro, se virino kuraĝas lin kritiki.

Kvinjara sendependa Kosovo

La 17-a de februaro 2008 estis por albanoj de Kosovo sankta tago, atendata de jarcentoj. Post 500 jaroj de sklaveco por kosova popolo finfine malfermiĝis la verda lumo de sendependeco! Ĉi jare oni festis la kvinan datrevenon de tiu evento – ĝoje kaj feliĉe ne nur en Kosovo, sed ankaŭ en Albanio, Makedonio, Montenegro, Serbio, kie vivas sur siaj propraj teroj albanoj. Aparte tragika estis la vivo de kosovanoj sub la serba jugo, dum 100 lastaj jaroj.

En la jaro 1912, kiam Serbio aneksis Kosovon, oni notis grandajn masakrojn kaj veran dezertigon de la lando fare de la serba armeo. Inter tiuj, kiuj raportis pri tiaĵoj estis ankaŭ la fama Leon Trocki, rusa-hebrea komunisto, kiu deĵoris kiel militkorespondanto de la ĵurnalo “Kievskaja Mis!” . Jen kion skribis li la 23-an de decembro 1912:

“La teruraĵoj ekvidebliĝis ĵus kiam ni transpasis la landlimon. Je kvina horo posttagmeze ni alproksimiĝis al Kumanovo. Ju pli multe malheliĝis, des pli multe ekbrilis la fajroflamoj, suprenirantaj al la ĉielo. Ĉio ĉirkaŭ ni bruliĝis. Ĉiuj albanaj vilaĝoj enflamiĝis...”

Pli poste la aŭtoro rakontas ke tiaj vidaĵoj sekvis lin dum la tuta vojaĝo de Kumanovo al Skopje. En la stacidomo de la dezertigita Skopje, ebria serba soldato, ĉetniko, kun la botelo da brando en unu mano kaj la longa tranĉilo en la alia, ludis kun kaptitaj albanoj kiel la kato kun la musoj: “Ekstaru!”, “Eksidu!” kaj devigis ilin drinki brandon. Alia soldato, sobra, diris al iu vojaĝanto pri homoj, moke pritrakitaj de lia kamarado: “ Ĉi tiuj estas arnaŭtoj (albanoj). Nun ni buĉos kaj dispecigos ilin”.

Aliaj amasaj masakroj okazis ankaŭ en la jaroj 1944-1945, kiam en Kosovon reeniris la serba, komunisto armeo.

La 2-an de julio 1990 la tiama Parlamento de Kosovo, antaŭ la pordoj de la kunveno proklamis la Deklaracion de Sendependeco, enkadre de Jugoslavia Federacio, kiun ne agnoskis la reĝimo serba. La 7-an de septembro, samjare, oni aprobis en Kaĉanik la Konstitucion, sed la registaron oni ekzilis eksterlanden.

En la jaro 1991 okazis tutpopola referendumo, kiu proklamis oficiale Kosovon sendependa ŝtato kaj elektis kiel prezidanton d-ron Ibrahim Rugovo, kiu organizis la pacan rezistadon kontraŭ la sovaĝa serba reĝimo. Dume ene de la popolo plifortiĝis la solidareco. Prof. Anton Ĉeta entreprenis agadon por pardoni sangajn persekutojn.

Miloŝeviĉ ordonis maldungadon de ĉiuj publikaj oficistoj, (ĉirkaŭ 110 000 personoj). Edukado, Akademio de Sciencoj, informaj rimedoj (radio, ĵurnaloj), sanigaj institucioj, estis paralizitaj aŭ fermitaj. Same la universitato de Priština kaj ĉiuj albanlingvaj lernejoj.

Multaj intelektuloj estis malbontrakitaj, enprizonigitaj, murditaj. Centoj kaj miloj da personoj forlasis siajn hejmojn kaj fuĝis eksterlanden. En la ekzilo albanoj fondis humanitarajn asociojn por kolekti monon. Po je 3 % de iliaj enspezoj ili dediĉis, por apogi la ŝtaton kaj plimalgrandigi haoson enlande. Agis slogano “familio helpas familion” kaj la helpo venadis de ĉiuj albanaj teritorioj, el Valo de Preŝeva, Okcidenta Makedonio (Ilirida) kaj diasporo. Oni memorganizis sin por liberigi Kosovon, akumulis financajn rimedojn por armado. Fondiĝis Nacilibera Armeo UĈK, subtenita ankaŭ de registaro de Albanio. Ekzercis ĝin militistaj spertuloj. Ankaŭ komenciĝis la unuaj militagoj, kiuj forprenis centoj da martiroj.

UĈK estis oficiale fondita la 28-an de novembro 1997. La masakro de Reĉak (15. 01. 1999) atestita ankaŭ de fremdaj observantoj de OSCE kaj la arm-rezistado de familio Jasharo en Prekaz, kie falis 53 membroj de ĝi, notis alian ateston de serba genocido kontraŭ albanoj. La amasa forpelo de albanoj (ĉ. 1 000 000) al Albanio, Okcidenta Makedonio, Montenegro kaj aliaj eŭropaj landoj, murdado, bruligado kaj dezertigado de iliaj teroj, incitis NATO-n interveni per aera bombardado de militistaj bazoj de Serbio.

Dum la NATO-a kampanjo Miloŝeviĉ malfermis la pordojn de la prizonoj, el kiuj eliris krimuloj por masakri albanojn kune kun antaŭmilitistaj taĉmentoj kaj solduloj rusaj kaj rumanaj. Pli ol 15 000 personojn oni mortigis, 5 000 malaperis, 20 000 knabinojn estis perfortitaj.

Post 73 tagoj da bombardado, la reĝimo de Miloŝeviĉ cedis, akceptis la interkonsenton de Kumanovo, laŭ kiu 40 000 soldatoj, policistoj kaj serboj forlasis Kosovon. Anstataŭe al Kosovo eniris trupoj de NATO. Kosovon ekadministris miloj da oficistoj, policistoj kaj soldatoj de UNO.

Kosovo praktike fariĝis libera ekde junio 1999 kaj la homoj turniĝis al la rekonstruado kaj demokratio. La 17-an de februaro 2008 ĝi proklamis sian limigitan sendependecon kaj fine de la jaro 2012, plenan sendependecon. Tamen la trupoj de NATO kaj EULEX plue restas tie ĝis kiam la interrilatoj kun Serbio pliboniĝos, kaj ĉi lasta agnosku la novan ŝtaton. Tiucele, ekde du jaroj okazas regule en Bruselo kontaktoj inter reprezentantoj de Kosovo kaj Serbio.

Aktuale Kosovon agnoskis pli ol 98 membro-ŝtatoj de UNO. Bedaŭrinde, ankoraŭ ne agnoskis ĝin 5 membro-ŝtatoj de EU (Slovakio, Grekio, Kipro, Rumanio, Hispanio). La EU-parlamento antaŭ nelonge alvokis, ke ankaŭ tiuj ŝtatoj agnosku Kosovon, kiu aspiras esti membro de EU.

Restas seriozaj problemoj surkampe de politika integro de la lando, (ekzisto de paralelaj strukturoj norde), ekonomio, senlaboreco, izoliteco. Lastatempe la ĉefministro Haŝim Taĉi kritikis respondeculojn de Bruselo rilate la prokrastiĝon de liberalizo de vizoj por civitanoj de Kosovo. Siaflanke, en la decembro 2012, dum Konferenco pri Sekureco en Munkeno, la ĉefministro de Albanio, Sali Beriša, atentigis eŭropajn politikistojn, ke albanoj loĝantaj en kvin balkanaj ŝtatoj neniel povas konsideri diversajn naciojn. Estas nur unu nacio, t.e. Albana, aspiranta integri enkadre de EU.

Bardhyl Selimi

Sankta Valenteno – nekonata, sed populara sanktulo

Pola antaŭnomo Walenty devenas de la latina lingo kaj apogiĝas je participo *valens*. Antaŭnomo Valens signifas *forta, potenca*. Pola formo de ĝi ekestis surbaze de la dependaj kazoj latinaj: Valentis, Valenti k.t.p. Parolantoj de la latina lingvo uzadis ankaŭ antaŭnomojn Valentinus kaj por virinoj Valentina, kiuj miksiĝis en diversaj lingvoj kun Valens, do ekz. en slavaj lingvoj ni havas ankaŭ antaŭnomojn Walentyn kaj Walentyna, kiuj estas apartaj lingvaj aĵoj ne montrantaj parencecon kun Valens.

Antaŭnomo Walenty estas konata en Pollando de mezepoko, ĉar jam en XVI-a jarc. ĝi estis sufiĉe populara. En jarc. XIX oni opiniis ĝin antaŭnomo tipe kamparana kaj maleleganta. Kiel pruvo de ĉi konvinko povas servi multaj folkloraj kantoj, en kiuj ĉi nomo rolas. Ekz. knabino de Silezio en la kanto preĝpetas: [...] Unufri i Walenty,/ Wojciechu i Wincenty,/ Antoni de Padua/ Chłopa bym rada cuła. Ekzistas populara kanteto pri onklo Walenty, kiu tikletas kalkanojn de onklino (A wujek Walenty łaskotał ją w pięty). Ankaŭ oni povis instigi vilaĝajn muzikistojn por laboro kriante: Ek, Walenty (Rzńnij Walenty). Karesaj formoj de ĉi antaŭnomo en Pollando estas Waluś kaj Walek. Tiuj formoj kun la baza Walenty ofte estis utiligataj en literaturo por vilaĝaj, kamparanaj herooj kaj en anekdotoj, precipe montarantaj.

De antaŭnomo Walenty devenas polaj nomoj: Walenta, Walentynowicz, Wala, Walisz, Walas, Walicki, Walek, Walkosz, Walecki, Walczak, Walczewski, Walach, Waluch, Waluszek, Walaszek, Faltyn, Fołtyn.

Antaŭnomon Walenty uzas ankaŭ angloj, germanoj, hispanoj kaj rusoj en formo Valentin, francoj kiel Valens kaj Valentin kaj italoj en formo Valente kaj Valentino.

La romaj fontoj rememoras ok sanktulojn de ĉi tiu nomo kaj Bibliotheca Sanctorum pli ol dekkvin. La plej konata estas Valenteno, martiro roma, al kiu oni dediĉis la daton dekkvaran de februaro. La saman daton oni atribuis al alia Valenteno, kio kaŭzis iajn miskomprenojn kaj kverelojn, ĉu kulto de ĉi sanktulo migris de Romo al Terni (Umbrio), aŭ inverse. Pli probable ŝajnas opinio, ke kulto de episkopo detranĉita en Terni atingis Romon kaj lokiĝis ĉe Via Flaminia. Komence de IV-a jarc. oni jam omaĝis la tombon de la martiro, super kiu papo Julio la Unua konstruis bazilikon, kiun poste renovigis papo Teodoro la Unua. Pri ĉi tiu tombo mencias multaj pilgrimoj, taglibroj kaj raportoj pro vojaĝoj. Ĉiuj skribatestoj pri la sanktulo ne estas fidindaj. Estante prefere rakontoj apokrifaj t.e. entute enpensitaj, substrekantaj atrakciajn aspektojn de konduto kaj martira morto de la sanktulo. Do ni scias pri li nenion certan. Kiel en multaj similaj kazoj tio ne malhelpis en disvolviĝo de la kulto, kiu volonte utiligadis legendon kaj disvastiĝis en preskaŭ tuta Eŭropo. Ĝi atingis ankaŭ Pollandon kaj ekfloris precipe en diocezo de urbo Przemyśl, kie sanktan Valentenon oni faris eĉ dioceza patrono. Niaj orientaj najbaroj ankaŭ omaĝis sanktan Valentenon,

pri kio pravas ortodoksaj ikonoj montrantaj simpatian oldulon kun griza barbo en ruĝa vesto de martiro. Sur lia brusto pendas granda kruco, li per la dekstra mano benas kaj en maldekstra tenas rulaĵon de papero kun rimarkoj pri lia profunda spirita vivo.

En lokoj, kie sankta Valentino estis pli populara la eklezio zorgis pri konservado kaj disvolviĝo de lia kulto. Al tio servas litanioj kaj preĝoj, en kiuj oni povas observi ecojn utilajn por edifi la kredantaron. Jen kelkaj citaĵoj el ili: **Sankta Valentino**, sacerdoto kaj martiro, defendanto de kristanismo, kuracisto de malsanuloj, venkinto de malbonaj fortoj, eksterordinara miraklfaranto, patrono en granda malsano, palmo de martiroj. **Ni preĝu:** Dio, kiu per fajro de la amo ekbruligis Sanktan Valentenon kaj igis, ke li prineglektu minacojn de tirano, igu por ni, omaĝante lian martiron estu liberigitaj de ĉiuj malsanoj kaj de la morta peko. Sankta Valentino, zorganto de tiuj, kiuj amas, kiu al dank' al martireco akceptita pro la amo – venkis ĉiujn fortojn de indiferento, malamo kaj morto – bonvolu permesi al ni ami per amo forigita de egoismo, por ni estu fidelaj atestantoj de la Dia Amo.

Sankta Valentino ĉeestas ankaŭ forte en folkloro rolante en popolaj kutimoj, sed okazis kurioza, klara diferencigo. En Germanio, Pollando kaj aliaj slavaj landoj li estas patrono de gravaj suferoj, antaŭ ĉio de terura malsano, epilepsio, dum kiam en Anglio kaj Usono li estas patrono de ekamiĝintoj. Lia tago donadis pretekston por donaci al amata persono etan donaceton. Ĉi kutimo, bedaŭrinde, transformiĝis en senbridan kaj senpensan perforton de la komerco, kiu instigas nin aĉetadi kaj donacadi pli kaj pli multekostajn kaj luksajn varojn. Al tio akompanas simboliko de la amo komplete senigita de senco kaj gusto. Porvirinaj revuoj prezentas vetkuron de diversaj konsiloj, kiamaniere la plej bone aranĝi la feston al sankta Valentino. Certaj el ili vere estas ravigaj, ekz.: „Antaŭ ol ni donacos ĉokoladetojn – ni aldonu al ili pli multe da dolĉeco. La pakajeton (devige en formo de koro) ni involvu en ruĝan aŭ rozkoloran paperon, ĉirkaŭligu per brilanta rubandeto kaj ornamu per floroj freŝaj aŭ paperaj, eltranĉitaj el sorbopapero. Por ilin alglui ni uzu duflankan glubendon”. „Por fari aŭ ornami la valentenan donacon oni povas utiligi ĉion – detranĉaĵojn de materialoj, kapsulojn, makaronion aŭ gazeton”. „Al valentena solena vespermanĝo kun amato (amatino) dezirata estas la ĝusta klimato. Uzante simplajn dekoraciojn el floroj, rubandoj, teksaĵoj, kandeloj ni ŝanĝu nian ĉambron en romantikan anguleton, navigistan tavernon aŭ tropikan insulon. Uzante konvenajn bak-muldilojn vi povas fari lekbombonojn aŭ friti poĉitaj ovojn en formo de koro”.

Por tia erupcio de miskomprenoj kaj kiĉo oni volonte aldonus al preĝoj kaj litanio omaĝe al sankta Valentino peton pri restarigo de la saĝo kaj prudento ĉe ceteraj omaĝantoj. Ni amu nin reciproke ne permesante atingi stadion de frenezo. De tempo al tempo ni elpensu pri aferoj ligitaj kun ĉi sanktulo – tipa ekzemplo ilustranta konatan principon, ke kie ne ekzistas sufiĉa nombro da faktoj, tie naskiĝas legendo.

Lidia Ligeza

Krakova Societo ESPERANTO

La programo de la renkontoj januare, februare kaj marte 2013 j.

10. 01. – Lidia Ligeza. „Verda Parnaso“ de Julio Baghy en traduko polen de Urszula Tupajka

17. 01. – **La Novjara renkonto kun partopreno de Irena Urbańska: Kantikoj en diversaj lingvoj**

24. 01. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**

31. 01. – Stanisława Śliwińska. **Fabeloj de Hans Christian Andersen: „Du fratoj” kaj „La Plej Bela Rozo”**

7. 02. – Lidia Ligeza. **Prezento de la propra poezi-volumo „Epizodoj”, Bjalistoko 2012**

14. 02. – Lidia Ligeza. **Sankta Valentino – nekonata, sed populara sanktulo**

21. 02. – Grażyna Porada. **La esperantaj lingvaj ludoj**

28. 02. – Andrzej Feuer. **Senŝanĝe mnemoteknikaj versaĵetoj**

7. 03. – Stanisława Szostak. **La kvina datreveno de sendependado de Kosovo laŭ informo de Bardhyl Selimi**

14. 03. – Stanisława Śliwińska. **Ferenc Szilágyi. Trans la Febeloceano. La virino kaj amo**

21. 03. – Alicja Sacha. **Sankta Patriko – la nacia hero de Irlando**